

# STIFTS

169

## El la enhavo:

Nia mastrumado en 1995  
Tri verkoj de Piĉ  
Informoj el komitato  
Homonimoj 9  
Eldonaĵoj KAVA-PECH  
Gustumu la ciganam  
Kunlaboro kun FISAIC



## ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



SALUTON EL KONGRESURBO PRAHA

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio  
aperas 6-foje jare. Abono 15 gld.

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio.  
800 Kč por kvaronpago, 1500 Kč por  
duonpago, 2500 Kč por tuta pago. Duobla  
reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30%  
rabato.

**Membrokotizoj:** A 160 Kč, B 80 Kč, (C  
nulgita), D 40 Kč, E 40 Kč, F 3200 Kč. G  
100 Kč (Starto), eksterlandanoj 20 ECU,  
enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 335 Kč komencantoj,  
240 Kč progresintoj. Aliĝoj: Mgr. Vlasta Jana-  
ková, Smetanova 26, 541 01 Trutnov.

**Kiel ni mastrumadis en 1995?**

La mastrumado de la asocio estas unu  
el ĉefaj punktoj de ĉiuj komitatkunsidoj  
de ĈEA. La marta diskutis ekonomiajn  
rezultojn, kiujn oni nun prezentas al la  
membraro kun necesaj klarigoj.

Enspezoj	buĝeto/realo
Membrokotizoj	70 000/65 661,89
Vendoj	60 000/88 312,50
Korespondaj kursoj	10 000/ 4 933,60
Subvencio de MK	250 000/60 000,00
Heroldo de Esp.	9 000/ 2 014,00
Intern. Fervojisto	3 000/ 3 816,00
Membrokotiz. de UEA	3 000/ -
Pagoj UK Tampere	- /87 928,10
Starto	- / 223,37
Intersezoj	1 000/ 2 213,39
Donacoj	60 000/15 892,40
Dividendoj	- / 7 652,00
Konferenco de ĈEA	- /19 803,00
Bonhavaĵo Tourgast	84 000/ -
sume	550 000/354 422,17

Elspezoj	buĝeto/realo
Foruzo de materialo	10 000/19 181,60
Riparoj	30 000/ 250,00
Aĉetoj	- /54 308,20
El. energio	- / 8 207,80
Lumono	- / 600,00
Regalo	1 000/ -
Vojaĝkostoj	80 000/15 166,20
Poŝtokostoj	80 000/61 119,36
Telefono	- / 579,50
Eldonado	120 000/80 737,50
Kopiado	4 000/ 1 028,00
OOV	60 000/29 000,00
Funkcia kotizo	5 000/ 3 075,00
Neproduktaĵ servoj	25 000/16 602,00
Impostoj	- / 525,00
Bankopagoj	- / 1 494,50
Kupona privatigo	- /48 390,00
IKUE-kongreso	- / 9 282,00
Konferenco de ĈEA	60 000/34 350,00
Video-festivalo	50 000/70 654,80
UK Praha	- /69 810,40
Rezervoj	35 000/ -
sume	550 000/508 379,16

La ekonomia rezulto: 153 957,09 Kč

El elspeza flanko de la jarfina spezo-  
folio videbliĝas, ke la membrokotizoj  
alproksimiĝas al la buĝetita sumo kaj  
kontentige evoluas ankaŭ vendoj, kiuj  
iom superis la antaŭviditan sumon. Ne-  
cesas ties kreskoj ankaŭ en nuna jaro.  
La skribaj kursoj bedaŭrinde ege stagnas  
kaj oni ne povas atendi ŝanĝon en pro-  
ksima estonto. Unu el kelkaj kaŭzoj es-  
tas tro multekosta reklamado, sen kiu  
oni apenaŭ povas atendi pli vastan inte-  
reson de la publiko. Laŭ lastaj kelkjaraj  
spertoj la elspezojn por reklamoj apenaŭ  
kovris enspezoj pere de tiuj kursoj.

Tre alta sumo estas pagoj por la UK en Tampere - sed tiuj financoj ne apartenas al ĈEA, sed estis havaĵo de UEA, al kies konto oni devis la monon transĝiri (vidu sub elspezoj - UK Praha). Ankaŭ ne plenumiĝis donacoj kaj profitoj - pasintjare la asocio ne organizis „donackampanjon“ inter F-membroj por ne misuzadi malavarecon de niaj fideluloj. Gravan „truon“ en la mastrumado kaŭzas jam kelkjara bonhavaĵo ĉe la firmao Tourgast, kiu intertempe bankrotis kaj ĝiaj ŝuldoj estas malfacile ekzekuciblaj.

La subvencio de Ministerio de Kulturo estis nur kvarona ol atendite, sed tiun ni ne kapablas influi. Ni dankis eĉ por tiu subteno, kiun la asocio ricevis (kaj povis uzi nur por destinitaj celoj). Ceteraj enspezitaj monrimedoj jam ne estis tiom gravaj por ekvilibro de la buĝeto.

Komparante ambaŭ flankojn de la jarfina spezofolio oni tuj vidas, ke la asocio en la pasinta jaro mastrumadis kun negativa saldo. Kelkaj gravaj elspezoj estis kovritaj per buĝetitaj enspezoj (ekz. Video-festivalo kaj IKUE-kongreso per ministeria subvencio), aliajn rimedojn ni devis elspezi ĉu pro fakto, ke la financoj ne apartenis al ĈEA (ekz. UK Praha), ĉu pro tio, ke oni devis dekalkuli financojn jam pli frue elspezitajn (kupona privatigo). Sed male - pro prudenta financa konduto ni ŝparis personajn elspezojn (t.e. salajroj kaj pagoj por faritaj laboroj) kaj elspezojn por eldona agado - kalkulita nur Starto, ĉar alia eldonaĵo ne aperis je propra asocia kosto. Oni ŝparis ankaŭ vojaĝelspezojn, ĉar la funkciuloj, al kiuj laŭstatute pagendas necesaj vojaĝpagoj, uzas nur la plej malmultekostajn vojaĝrimedojn.

Ŝparis ankaŭ niaj sekcioj - sed ĉefe pro ilia malgranda agado, kio ne estas pozitiva fenomeno.

Por ni katastrofan alton atingis poŝtaj pagoj, kiuj preskaŭ egalas al kompleta membrokotizo samkiel „materialoj“, t.e. kovertoj, membrokartoj, legitimilon ktp. La kialoj estas ĝenerale konataj kaj de ni nur malmulte influeblaj. Ekzemple en la pasinta jaro decidis la komitato fari ordon en la membrokartoteko, kio fine kostis preskaŭ dekkvinmil kronojn, sed tio sekve respuguliĝis en malpliigo de elspezoj, ĉar oni ne plu sendos Starton al nekotizintoj kaj eksmembroj de ĈEA, kio ĝis nun ofte okazis. La negativan rezulton de la tutjara mastrumado influis ankaŭ elspezoj por la konferenco de ĈEA, kiu ja ne superis la buĝetitan sumon, tamen estis pli altaj ol tiucelaj enspezoj. Estontece ankaŭ ĉi tie ni devos pli ŝpari kaj limigi subtenon al la partoprenontoj el la asocia kaso.

Laŭ tie ĉi prezentita trarigardo estis konstruita la buĝeto por tiu ĉi jaro. Oni ege zorge pesis ĉiun necesan elspezon kaj komparis ĝin kun realaj enspezoj. Kvankam entuta spezo estos multe pli alta ol en la pasinta jaro (ĉefe pro UK Praha), ni esperu, ke gravaj ŝparoj kaj prudenta asocia agado ekvilibrigos la ekonomion kaj kontribuos al stabileco de ĈEA.

La publikigo de la tutjara mastrumado estu instigo por membraro por serĉi novajn fontojn de financoj kaj por pli racia agado de nia tuta kolektivo.

VI. Kočvara

## Ĉehlingva gazeto pri Esperanto-eldonejo

La gazeto „Knihy“ (Libroj), en kiu aperas informoj pri libroj nove eldonitaj en Ĉeĥio, publikigis en sia n-ro 46/1995 intervjuon kun docento Petro Chrdle, eldonisto de publikaĵoj en Esperanto. Ni peras la artikolon en traduko:

Ni prezentas la eldonejon

KAVA-PECH

(Kongresa kaj kleriga agentejo de  
Petr Chrdle)

*Kiel estiĝis via eldonejo kaj kia estas ĝia ĝisnuna historio?*

Kiel jam malkaŝas la nomo de mia agentejo, ni okupiĝas ĉefe pri la kongresa turismo kaj tiu venigis min ankaŭ al eldonado. Nome, mi vane klopodis trovi eldonejon, kiu eldonus prelegarojn (pri kiuj ni kredas, ke ili havas daŭran valoron, kaj tial ni deziris ricevi ISBN) en kvanto ĉirkaŭ 200 ekzempleroj kontraŭ prudentaj kostoj. Tial mi registrigis min kiel eldonisto kaj komencis fari mem miajn prelegarojn. La preparo de libroj fariĝis hobia kaj mia kaj de mia edzino, kiu estas samtempe mia plej proksima kunlaboranto. Poste ni provis ankaŭ aliajn publikaĵojn. Unue ni restis ĉe la faka literaturo, precipe en la kampo de pedagogio kaj kleriga kibernetiko, poste ni aldonis nian grandan ĉevaletan kaj komencis eldonadi publikaĵojn en la internacia lingvo Esperanto kaj lernilojn por instrui tiun lingvon, ekz. Esperantan-ĉeĥan vortaron de la aŭtoroj Kraft, Malovec kaj kiel la plej novan la ĵus eldonitan lemolibron Esperante dum 3 monatoj. Tiun mi verkis kun mia edzi-

no origine laŭ mendo de la gazeto Ĉeský expres, kie ĝi estis aperanta daŭrigote en 1992. Nun ni aperigas ĝian duan, pli ampleksigitan eldonon libroforme.

*Kiom da publikaĵoj vi eldonis ĝis nun kaj kiajn problemojn vi frontas?*

Ĝis nun ni eldonis 27 publikaĵojn, el kiuj la plejparto havas sian specifan merkaton kaj ni eĉ ne provas proponi ilin al librovendistoj (faklibroj en la germana, ĉeĥaj-germanaj-anglaj, literaturo skribita en Esperanto k.s.). Aliflanke ni penas penetri la normalan libromerkaton per publikaĵoj, pri kiuj ni estas konvinkitaj, ke pri ili interesiĝos ankaŭ la vasta publiko, ĉu pri Esperantaj lerniloj (vortaro, lemolibro), ĉu pri kelkaj populare prezentitaj publikaĵoj (ekz. *Latino kiel internacia lingvo* de V. Barandovská-Frank aŭ *Danĝero de tropikaj malsanoj* de R. Sachs. Plejparto de librovendistoj kaj distribuantoj, kiujn ni adresis ĝis nun, timas tiun literaturon, tial ĝi ne povas atingi legantojn en kelkaj regionoj. Sed ekzistas ankaŭ esceptoj. Preskaŭ ne pasas semajno, en kiu ne mendus niajn publikaĵojn la librovendejo Fišer, kaj estas eĉ tiaj, kiuj unu prenis ekzemplerojn prove, sed poste mendis ankaŭ literaturon verkitan en Esperanto. Kaj ne nur en grandaj urboj. Nia daŭra kliento de la esperanta literaturo estas ekz. librovendisto Jiří Rada el Nový Bor. Tio donas al ni veran plezuron. Sed vi demandis ankaŭ pri la problemoj: do nia ĉefa problemo estas nur unu, sed principa: penetrigi nian literaturon sur la librovendejajn vendotablojn. Se ni atingos tien, mi ne plu timos.

*Kaj viaj planoj por la estonteco?*

Daŭrigi la ĝisnunan direkton (pedagogia kaj kleriga literaturoj, prelegaroj por niaj internaciaj konferencoj, esperanta literaturo, en kiu ni sisteme prezentas la ĉeĥan literaturon - post eldono de verkoj de K. Čapek kaj J. Hašek ni nun preparas i.a. rakontojn de Franz Kafka). Sed ni volas eldonadi ankaŭ literaturon por subteni turisman trafikon kaj enlande (ni preparas gvidlibron tra Prago en multaj lingvaj mutacioj, krom la kutime aplikataj lingvoj ankaŭ ekz. en Esperanto, en la japana kaj en la korea.) samkiel ankaŭ en la teritorioj, kien transportas niajn klientojn vojaĝ-agentejo KAVA-PECH: temas pri publikaĵoj pri Japanio kaj Koreujo, provizore kun labortitolo Japanio (Koreujo) de proksime. Ĉiokaze mi estos en unu persono eldonisto, aŭtoro kaj fotisto. Ili estas landoj, kiuj entuziasmigis min, kien mi revenas kun plezuro, kaj kun plezuro mi dividos miajn spertojn kun la legantoj.

**Petr Chrdle, Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj, Dobřichovice (Prago) 1995, ISBN 80-85853-16-7, 40 paĝoj.**

D-ro Chrdle parolis pri la profesia uzo de Esperanto dum la Akademia Kolokvo 1994 pri *Stato kaj Estonteco de la Internacia Lingvo Esperanto*. Nun li eldonis sian tekston aparte. Lia temo estas gravega ĝuste por la estonteco de Esperanto: ĉu la lingvo donas utilajn servojn? Kiomgrade ĝi taŭgas por la profesia vivo?

La aŭtoro priskribas proprajn spertojn. Estante sciencisto li metas ilin en sisteman kadron. La pronomo „mi“ aperas ofte en la teksto. Tio donas aŭtentecon al la prezentita materialo, kiu fariĝas eĉ pli kredinda pro la ankaŭ rakontitaj malbonaj travivaĵoj.

Ĉefe li pritraktas du ekonomiajn branĉojn, kiuj estas pli facile alireblaj por komercantaj esperantistoj: eldonado kaj turismo. Li ne prezentas teoriojn, sed montras la merkatan praktikon. Tial lia libreto enhavas valorajn konsilojn. Mi mem lemis el ĝi pri mia eldona agado. Tiel same ĉiu legonto povas profiti.

Chrdle estas pragmatisto. Li ne predikas belajn esperojn, sed ankras en la realeco, eĉ se tio sonas malagrabla en esperantistaj oreloj. Kompreneble Esperanto alportas jurajn problemojn, se ĝi estas la lingvo de negoca kontrakto: kiu tribunalo postekzamenos ĝiajn klaŭzojn? Estas pli bone lemi ĉe Chrdle kiel preteriri tiun malfacilaĵon ol poste suferi malavantaĝojn.

La libreto havas plaĉan aspekton, kvazaŭ modelo kiel oni faru aĉetindan aksterajon. La paĝoj estas plenŝtopitaj sed bone legeblaj pro taŭga presado. Kiel maldika libreto ĝi ne povas vaste priskribi sian temon. Do ĝi prilumas interesajn facetojn. Tio estas kaj malforta kaj forta flanko de la verko de Chrdle. Estas necese akumuli pli da spertoj pri komercado per Esperanto. Bonvena estas la kontribuado de Chrdle al tiu ampleksa temo.

Dr. Werner Bormann (Hamburgo)  
PS: Laŭ mia kontrolo en PIV *prediki* kaj *sufəri* estas kaj *tr* kaj *ntr* (zamenhofaj ekzemploj)

**KAVA-PECH:**

**Preparataj publikajoj en Esperanto kaj tiuj en la ĉeĥa, kiuj estas tradukitaj el Esperanto**

Por aperigo antaŭ la kongreso en Prago la eldonejo KAVA-PECH preparas jenajn verkojn en Esperanto:

Chrdlová Stanislava: Prago kiel turisma celo (konciza gvidlibro tra Prago verkita de profesia ĉiĉeronino)

Chrdlová Stanislava, Malovec Miroslav: Baza ĉeĥa konversacio (komuna verko de jam konata gramatikisto Malovec kaj instruistino, instruanta la ĉeĥan al la universitataj studentoj en Seulo Chrdlová promesas koncizan, tamen praktikan enkondukon en la ĉeĥan por eksterlandaj esperantistoj)

Kafka, Franz: Elektitaj rakontoj. Elektis kaj tradukis de la germanaj originaloj Wilhelm Luttermann.

Kavka, Josef: Kontribue al PIV. Homonimoj en Esperanto konsiderataj nomenklature (lingvistika traktado pri homonimoj en Esperanto, al la legantoj de Starto konata, ĉar poparte ĝi la verkon jam aperigis.

Urbanová Eli: Peza vino / Těžké vino. Poemkolekto de esperantlingva mondkonata poetino en esperantaj originaloj kaj paralelaj tradukajoj fare de Josef Rumler en la ĉeĥan.

Krome estas preparataj tradukajoj de Aŭdienco (Václav Havel) kaj Naŭ fabeloj de Karel Čapek kun ilustraĵoj de

Josef Čapek, ambaŭ en tradukoj de Josef Vondroušek. Apero de ambaŭ verkoj dependas de la rezulto de petoj je kopiĵoj.

Ĉu vere aperos la libro pri Prago, por kiu la eldonejo ne disponas je bezonata kapitalo, dependas de sukceso en la varbkampanjo por anoncoj en la libro. Eventualaj helpantoj tiukampe estas varme akceptataj, la gajno estas 20% de la monsumo ricevita de varbitaj anoncantoj.

La libroj, kiuj aperos en la ĉeĥa en tradukoj de esperantlingvaj originaloj:

Kurusu Kei: Co mi dala česká literatura. Vyznání japonského překladatele. Konfeso de diligenta japana tradukisto de la ĉeĥa, kiu en sia verko abunde mencias Esperanton.

Lee Chong-Yong: Vzorec ekonomického úspěchu. Dvacetiletá zkušenost z Asie. Vidpunkto de sudkorea profesoro de ekonomio kaj prezidanto de UEA pri la ekonomia miraklo en Azio kaj ĝia klarigo.

Umeda Yosimi: Jak úspěšně vyjednávat s Japonci. Priskribo de la japana pensmaniero kaj de la postkulisa traktmaniero antaŭanta decidojn en japanaj kompanioj, kio estas grava por povi sukcesplene negoci kun japanoj

Vogelmann Bruno: Nový realismus. Výsledky nového myšlení. La publikajo montranta novan pensmanieron, tradukita el esperanta originalo en la ĉeĥan kiel en la 18-an lingvon.

### Kunlaboro kun polaj esperantistoj

Nia E-klubo Ostrava-Vitkovice ligis pli intimajn kontaktojn kun kluboj en pola Cieszyn (Polsky Těšín) kaj Bielsko-Biala. Ni interkonsentis interŝanĝi prelegantojn. 29.2.1996 je la 16-a horo mi prelegis en Cieszyn pri la temo „Kiel Esperanto kontribuis al mia vivo“. Venis 30 aŭskultantoj, inter ili rusoj kaj ĉina kuracistino, kiuj dejore laboras en Polujo. Pluan prelegon mi prezentos printempe en Bielsko-Biala. Dum la tria dimanĉo juna 16.6.1996 ni renkontiĝos sur la monto Ĉantoryja. Radikoj de tiu aranĝo devenas el la tridekaj jaroj kaj ni invitas ĉiujn esperantistojn partopreni la renkontiĝon sub la libera ĉielo.

Drahomir Kočvara  
Hulvácká 18  
700 30 Ostrava

### Biciklistoj ek al UK!

Mi estas 70-jara biciklisto kaj mi intencas bicikli Pragon por partopreni la 81-an UK-on. Se mia sanstato kaj sportkapablo estos ankoraŭ tiaj, kiel hodiaŭ, mi certe biciklos.

La distanco de nia urbo Havířov al Prago ne estas longa kaj mezuras nur 360 kilometrojn. Mi biciklus ekipita per tendo, dormsako kaj aliaj tendarbezonoj, kiel ĉiam, kiam mi en pasinteco trabicikladis Ĉeĥoslovakion, GDR-on, Pollandon, Hungarujon, Rumanujon, Bulgarijon, Jugoslavion kaj - post rompiĝo de nia komunista kaĝo - ankaŭ Aŭstrion kaj Federacian Germanujon.

Per tiu ĉi sciigo mi turnas min al ĉiuj esperantistoj-biciklistoj, ne nur ĉeĥaj, sed el la tuta Eŭropo: ankaŭ vi kunbiciklu al UK!

En Prago ni poste povus entrepreni solenan propagandan trabicikladon pri Esperanto, Zamenhof, UK ktp. Niaj bicikloj povus esti ornamitaj per verdaj steloj, E-flagetoj, naciaj flagetoj, girdoj kaj diversaj poresperantaj surskriboj. Ni ĉiuj povus havi ankaŭ anonc-tabuleton kun surskribo, el kiu lando kaj urbo ni albiciklis kaj kiom da kilometroj ni traveturis. Vi, kiuj alvenos vagonare aŭ aŭtomobile, kunprenu viajn biciklojn kaj helpu al ni: ju pli multaj ni estos, des pli bone.

Bonvolu informi min, se vi volas kunbicikli, al la adreso: Schwetter Oldřich, Sadová 7, 736 01 Havířov-Město.

### Esperanto-klubo HAVÍŘOV kvardekjara

Havířov, situanta 12 kilometrojn oriente de Ostrava, havas preskaŭ 100.000 loĝantojn. La 12-an de septembro 1956 mi fondis en tiu urbo E-klubon. Post kvar jaroj komunistoj malpermesis al mi disvastigi Esperanton, sed nia klubo ne malaperis.

Nunjare, de la 15-a ĝis la 17-a de novembro 1996 ni festos 40-an datrevenon de nia klubo. Dum tiuj tagoj samtempe okazos la 8-a nacia kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Mi petas ĉiujn gesamideanojn afable sendi al ni salutojn kaj bondezirojn per leteroj, poŝtkartoj, poemoj, kantoj, desegnoj, fotoj ktp. por efektiviĝi malgrandan ekspozicion.

- O.Schwetter-

## TRI VERKOJ DE KAROLO PIĈ

**Karolo Piĉ: Frua Pledo por la Iltisa Skolo. Analizo de la revuo „La Esperantisto“ (1889-1895).** Artur E. Iltis, Saarbrücken 1989, 31 paĝoj, formato A5

La unua E-gazeto „La Esperantisto“, aperanta en la jaroj 1889-1895, publikigis en 1893/1894 serion da artikoloj pri eblaj reformoj kaj plibonigoj de Esperanto, kiuj koncernis la ortografion sen supersignoj, la gramatikon sen tabelvortoj kaj leksikon sen nelatinidaj vortradikoj. Multajn el la proponoj faris Zamenhof mem, sed en la fina balotado la esperantistoj verdiktis, ke la lingvo restu sensanga.

Karolo Piĉ aprobas tiun decidon, ĉar en la komenca periodo la lingvo bezonis firman neŝanceleblan bazon, la tempo ankoraŭ ne estis matura por lingvaj eksperimentoj. Ĉefe li aplaŭdas la ĉapelitajn literojn, ĉar malgraŭ la teknikaj problemoj, kiuj estas venkeblaj, ĝuste la supersignoj kun la principo „unu litero por unu sono“ donas al Esperanto el lingvistika vidpunkto grandan elastecon.

Tamen - analizante la plej interesajn reform-proponojn - li trovas multajn saĝaj kaj raciaj, kiuj nun, post centjara evoluo de Esperanto, povus saltigi la internacian lingvon antaŭen. Pli precize dirite: li esprimas sian surprizon kaj miron, eĉ ŝokon kaj fascinon, kiam li trovis abundon da siaj novismoj lanĉitaj en *Litomiŝla tombejo* kiel malnovajn proponojn de Zamenhof mem! Kompreneble

tia koincido ne povas esti hazarda. ĝi male pruvas, ke elektado de vortoj konvenaj por la internacia lingvo havas sian logikon, kiu ankaŭ aliajn lingvistojn kondukus al la sama rezulto.

La tabelvortoj estas neanstataŭigeblaj per vortetoj tiritaj el la latino, sed la latinaj povas ilin riĉigi kiel sinonimoj. Simile ellatinaj prepozicioj, konjunkcioj, adverboj kaj afiksoj (pri substantivoj, adjektivoj kaj verboj eĉ ne necesas paroli). Sinonimoj neniam havas absolute saman signifon, la diferencoj ebligas esprimi ideojn kaj nuancojn ĝis tiam neesprimeblajn.

Karolo Piĉ vidas en „La Esperantisto“ modelon por la Iltisa skolo, kies ĉefa reprezentanto li restas eĉ post sia morto, kaj pruvon, ke la iltisa lingva praktiko estas ĝusta.

**Karolo Piĉ: Urbi et orbi. Repliko al Giorgio Silfer.** Iltis-eldonejo, Saarbrücken 1990, 20 paĝoj, formato A5.

Karolo Piĉ rifuzas asertojn, ke li apartenas al la Praga skolo (Urbanová, Rumler, Karen), ĉar li sentas sin iltisano kaj litomiŝlano. Se la praganoj ĉerpas el liaj verkoj, ekz. en *Abunde kaj redunde* de Josef Rumler, tio tute ne signifas, ke li apartenas al ilia skolo. Poste li klarigas sian rilaton al Kalocsay, kiun li alte estimas, sed neniel sekvas kiel modelon, ne amante tradukojn, sed nur originalajn verkojn. Simile kiel en la postparolo al *Litomiŝla tombejo* li eksplikas signifon de sinonimoj en la lingvo ĝenerale kaj en beletra speciale, kial verkisto ne povas kontentiĝi nur per minimum-vortar-



etoj kaj bezonas pli riĉan esprimilon por siaj verkoj.

Fine de la kajero trovas la leganto manifeston de la Iltisa skolo el 1987, en kiu la verkistoj anoncas sian fidelon al la Fundamento, sed samtempe rifuzas limigi la lingvon sole al tiu rudimento, taŭga por hobiaj celoj, sed ne por literaturo. Kiu ne ŝatas riĉan lingvon, tiu simple arton ne legu.

**Karolo Piĉ: Perspektivoj de la Ilustralo. Kun postparolo de Reinhard Hauthenthal.** Iltis-eldonejo, Saarbrücken 1994, 24 paĝoj A5

Ilustralo en la lingvaĵo de Karolo Piĉ estas nenio alia ol Plena Ilustrita Vortaro, kies aperon li aplaŭdas kiel inaŭguron de la nova epoko en la evoluo de Esperanto. Li komparas ĝin kun similaj inaŭguraj vortaroj nacilingvaj, ekz. kun la ĉeĥa vortaro de Jungmann, kaj vidas avantaĝon ĝuste en ĝia neperfekteco, kiu malfermas pardonon por vastaj diskutoj pri la lingvo kaj ĝia futura evoluo. Alte li aprezas la skemismon, pro kiu Esperanto estas ne *lingvo*, sed *lingvoaŭtomato*, kiu sola havas „ŝancon en la epoko de lavaŭtomatoj, vendaŭtomatoj, ludaŭtomatoj, tradukaŭtomatoj kaj jen eĉ pensaŭtomatoj.“ La skemisma principo ebligas tiri el naturalismaj vortoj, enŝteligitaj en la lingvon, novajn prefiksojn, sufiksojn kaj radikojn.

Ekzemple la sufisko -al- (katedralo = katedra preĝejo; novalo = nova plugteroj) povus fariĝi nepersona paralelo al -ul-: trimastalo = trimasta ŝipo, Ilustralo = Plena Ilustrita Vortaro, jaralo = io, kio

ĉiujare ripetigās (jarlibro, jarraporto, jar-kolekto, homoj de la sama naskiĝjaro, soldatoj de la sama servojaro, studentoj de la sama studjaro), vesperalo = io, kio rilatas vesperon (vespera ĵurnalo, vespera infana televidprogramo, vespera meso ks.). Ĝia universaleco similas al tiu de -il- (skribilo = gravurilo, kreto, krajono, plumo, tajpilo...).

La vortoj *komplika*, *impliki*, *apliki*, *repliki*, *multipliki* liveras radikon *pliki* kun vasta uzeblo: Kion vi plikas (babilmiksas)? Tio estas kunplikita afero! Ne pliku (erarigu) min! Nun vi enplikis vin tiom, ke vi ne plu scias elpliki vin! Kaj kial, entute, vi alplikis vin al tiu tumulto? Iru hejmen kaj ne ĉirkaŭpliku vin ie! Havi ĉirkaŭplikaĵojn kun la polico. Pliki la kapon al junulino. Esti enplikita en afero. Havi intimajn plikaĵojn kun virino.

PIV registras preskaŭ la tutan vortokrean historion de Esperanto dum la centjara evoluo, el kiu eblas tiri gvidprincipojn kaj prilaborindan materialon por la futuro. Karolo Piĉ prezentas multajn aliajn ekzemplojn, kiujn ni ne povas citi pro lokmanko - sed estos pli bone, se vi legos mem la tutan verkon.

La verkojn de Karolo Piĉ eblas mendi ĉe Iltis -eldonejo (Postfach 600130, D-66119 Saarbrücken, Germanio) aŭ ĉe Libroservo de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando)

## Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature 9

Josef Kavka

### -AR-, -ER-

Naŭe (STARTO, 1994, 4, 20-21; 5/6, 23-26; 1995, 1, 12-14; 2/3, 17-19; 4, 8-11; 5, 5-7; 6, 10-14; 1996, 1, 13-19) ni provos okupi nin pri nomenklatura koincido de la sufiksoj -AR- kaj -ER- kun iliaj homonimoj radikfinaj. Tuj dekomence ni malkaŝu ĝojigan fakton: ĉi-okaze, timo antaŭ homonimoj estas tre-ege malofta.

El la **fundamentaĵoj** eblas mencii **kataron** homoniman kun kat-aro. Pli grava okazo estas **omaro** (*Homarus*), kies scienca nomo pravus esti **homaro**, homonima kun hom-aro. Nia Majstro klopodis eviti la homonimecon, apoginte sin sur *it: omàro*. Tamen, oni devus respekti la kodigitan formon latindevenan, kies *H* aperas en multaj lingvoj, do estas sendube internacia (*cs: humr, de: Hummer, fr: homard, hu: homár, po: homar, sk: homár* k.t.p.).

El la vortoj **oficialaj** apenaŭ iu interesus nin: **barbaro** estas homonima kun barb-aro, **kultivaro** (= kulturvario) kun kultiv-aro.

Inter la **neoficialaĵoj** meritas nian atenton jenaj:

1. **adulario** nepre devas fariĝi **adularo** (*cs: adulař, de: Adular, en: adular, fr: adulaire, ru: aduljar, sp: adularia*). La ĵus prezentita kelko da etnolingvaj ekvivalentoj montras, ke la PIVa mineralogo elektis la formon hispaneskan. Kial? Ja

neniu homonim-danĝero minacis; ad-ularo estas neglektebla. Cetere ne temas pri kodigita mineral-nomo; en *Høeg* (1988) ĝi prave mankas.

2. **damaro** (*dammara*), la pinofit-arbo estas sendanĝere homonima kun dam-aro,

3. **dinaro** kun din-aro,

4. **fulmaro** (*Fulmarus*), la procelario-forma birdo - kun fulm-aro,

5. **fumara** acido kun fum-aro. (Ekster nia -AR-konsidero troviĝas la planto **fumario** (*Fumaria*), homonima kun „fum-ario“ ...).

6. **kalmaro** (*la: calmarium*, science *Loligo*) estas cefalopodo homonima kun kalm-aro, t.e. senventaj tagoj.

7. **kantaro** (*Cantharis*) koincidas - tute sendanĝere - kun kant-aro,

8. **kuraro** kaj 9. **molaro** ne bezonas komenton.

10. **miliaro**, la medicina termino, ne timu konfuzon kun aro da milioj (*Milium*) el la tribo de la milieoj, la familio de la poacoj, la ordo de la poaloj.

11. **okulario** nepre fariĝu **okularo** (*cs: okulár, de: Okular, fr: oculaire, it: oculàre, po: okular, ru: okuljar* k.t.p.), sen timi konfuzon kun aro da okuloj ... Ĉi-loke necesas rimarkigi, ke nia konsidero - escepte de „adulario“ kaj „okulario“ - neniel intencas „pafi“ -IO-vortojn, kiuj estas ĝustaj: araŭkario, katario, laktario, pulmonario, saponario k.m.a.

12. **pedikularo** (*Pedicularis*) el la familio de la skrofuleriacoj povus - tute malprobable - konfuziĝi kun pedik-ul-

aro!

13. **polara** homonimas kun pol-ara,

14. **radaro** kun rad-aro, ambaŭ negrave. Ekzistas ankaŭ kurioza provo distingi aron da radoj disde radaro jene: „radoaro“! Jen rea ekzemplo de troigita timo antaŭ homonimo ...

15. **realgaro** estas en ordo; same **grosularo** registrita de *Kavka* (19-80) kaj *Høeg* (1988), sed mankanta en PIV; la radikfina -AR- estas tre malofta inter mineralnomoj, kp. kun la pli supra **adularo**.

16. sakaro superflue homonimas kun sak-aro, ĉar la fonetike pli ĝusta formo estas **saharo**.

17. **skalaro** homonimas ne sole kun skal-aro, sed ankaŭ kun la fama akvaria fiŝeto (*Pterophyllum scalare*), mankanta en PIV.

18. skapulario (*scapulare*) estas lanĉita fare de *WARINGHIEN*, sed la latina originalo referencus pli eble al **skapularo**. Tamen, ĉar ne temas pri naturscienca nomenklaturaĵo, ni lasas la terminon la terminon al prijuĝo de koncernaj specialistoj.

19. **tenaro** (*thenar*) homonimas kun ten-aro.

20. **terciaro**, la geologia termino, homonimas kun terci-aro.

21. **ternara** estas senriproĉa termino, kvankam ĝi havas nenion komunan kun ternado.

22. **velaro**, male senpere koheras kun la mola palato, ne estante ĝia „aro“.

Kiom temas pri la -ER-vortoj, la situacio estas simila. Jen amaso da vortoj

**fundamentaj:**

1. **ansero** (*Anser*) el la subfamilio de anserenoj (*Anserinae*), homonimas kun ans-ero; anso estas zamenhofa, laŭ PIV.

2. **bordero** ne estas bord-ero,

3. **fiero**: fi-ero,

4. **kajero**. La homonimo kaj-ero aperis nur post la oficialigo de kajo.

5. **kolero**: kol-ero,

6. **kulero**: kul-ero. Jen iometa motivo, kial science establiĝu kulico anstataŭ kulo (kp. la 8-an parton de niaj konsideroj),

7. **litero**: lit-ero,

8. **modero**: mod-ero,

9. **mortero**: mort-ero,

10. **papero**: pap-ero,

11. **parkero**: park-ero,

12. **pasero** (*Passer*) el la ordo de la **paseroformaj** (*Passeriformes*) homonimas kun pas-ero,

13. **pretero**: pret-ero,

14. **sukero**: suk-ero,

15. **tolero**: tol-ero,

16. **tubero**: tub-ero,

17. **vespero**: vesp-ero,

Al ili ni aldonu solajn du **oficialaĵojn:**

1. **humero**: hum-ero kaj

2. **latero**: lat-ero.

Da **neoficialaj** terminoj ni trovis multe pli:

1. **ariero**: ari-ero,

2. **bolero**: bol-ero,

3. **cicero**: cic-ero,

4. **estero**: est-ero,

5. **etaĝero** ja ne estas etaĝ-ero, tamen elvokante taŭgan parencon imagon.

6. **helero**: hel-ero,

7. **kaperi** (zamenhofa): kap-ero,

8. **koĉero**: koĉ-ero; tamen, parenteze dirite, „koĉo“ por *Coccus cacti* estas fonetike dubinda (el la vidpunkto nomenklatura), kvankam prave hispaneska (el vidpunkto laika).

9. **leĝera**: leĝ-era,

10. **masero**: mas-ero,

11. **nepero**: nep-ero,

12. **omero**: om-ero,

13. **premiero**: premi-ero,

14. **pubero**: pub-ero,

15. **sapero**: sap-ero,

16. **sidera**: sid-era,

17. **skotero**: skot-ero,

18. **subero**: sub-ero,

19. **supera**: sup-era,

20. **tempo**: temp-ero,

21. **vivero** (*Viverra*) el la familio de la **viveredoj** (*Viverridae*) homonimas kun viv-ero, kvankam ĝi estas vivega, ĉar viglega ...

22. **vomero** (*vomer*), la naza ostoj, estas en nenia konekso kun vomado.

Aldone, jen du terminoj el EB (1988):

1. **boksero**: boks-ero,

2. **pomero**: pom-ero.

Fine ni prezentu resuman statistikon: El 26 radikfinaj -AR-vortoj teorie homonimaj kun -AR-vortoj sufiksaj, ni konstatis solajn 4 okazojn de misformado por eviti la homonimecon. El 43 -ER-vortoj ni trovis neniun misforman provon.

Konkludo: Ambaŭ oncernaj sufiksoj estas „homonime sendanĝeraj“. Jen grava kontrasto al sufiksoj „danĝeraj“, ekz. -UL-, -IN-, -ID-. Ĉu la kaŭzo konsistas en la fakto, ke ĉi tiuj sufiksoj indikas vivulojn, dum -AR- kaj -ER- sen-

vivaĵojn? Tamen ankaŭ homaro, arbaro k.a. nepre vivas, kio apenaŭ povas esti asertata pri eroj ... Kaj rea tamen: ankaŭ iuj lumbrikeroj kapablas pluvivi ... Jen kapropa enigmo!

Ja ĉiu timo, do konsekvence ankaŭ la homonimfobio estas io tro subjektiva: la leksiko de Esperanto trafas dokumentation almenaŭ en la sferoj nomenklaturaj.

#### Fontoj

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (1970) - Sennacieca Asocio Tutmonda, *Paris*.

Laŭsistema vortaro de la rokajmineraloj (1980). *J. Kavka*. - *Scienca Revuo*, 89-92, *Pizo*.

Esperanta Bildvortaro (1988). *R. Eichholz* - Esperanto-Press, *Bailieboro*.

*Mineral Navn* (1988). *T. A. Høeg*. - *Universitetsbiblioteket i Oslo, Skrifter* 15.

Inversa vortaro de Esperanto (1989). *B. Pabst*. - Esperanto-Centro, *Paderborno*.

### Seminario en Nymburk

Dum sabato kaj dimanĉo (23/24.2.196) okazis en Nymburk en Domo de Junularo seminario por helpantoj dum UK Prago '96. La UEA-representanto Nikola Rašič unue klarigis, ke la helpantoj preparas UK-on por la ceteraj esperantistoj kaj devas tial kalkuli kun tio, ke ili mem ne ĝuos la kongresan programon. Poste la aliĝintoj dividiĝis je grupoj laŭ taskoj (bonveniga servo, loĝigo, ekskursoj, dokumentado, informado ktp.). ĈEDOK-representanto prezentis servojn de sia agentejo, kiuj certigos loĝadon, ekskursojn k.s. La praktika trejnadon de la helpantoj realiĝos en junio.

## Fervojistoj skiis en Ĉeĥio

Inter la 18-a kaj 24-a de februaro okazis jam 27-a Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno, ĉiŝoj unuan fojon en Ĉeĥio, nome en Moravia montaro Jeseniky. Ĝin organizis komisiite de Fervojista sekcio de ĈEA kaj IFEF la kongresa kaj kleriga entrepreno KAVA-PECH.

Partoprenis 40 partoprenantoj de 7 landoj (AT,CZ,FR,DE,DK,HU,SK).

Krom skiado estis speciala programo por promenantoj, gaja karnevalo (en kiu estis aljuĝitaj kiel la plej sukcesaj maskoj Muŝo - Jiří Dvořáček el CZ, Putino - Ivan Potiška el CZ kaj Fantomaso - Erik Mortensen el DK) kaj multaj konkursoj: krom en skiado (kategorion slalomo viroj venkis s-ano Konrád Kopečný-CZ, virinoj Eva Kopečná-CZ, skikurado viroj Ladislav Částečka-CZ, virinoj Ludmila Částečková-CZ), ankaŭ en tabloteniso (venkis Horst Theurich-DE). Dum kvizo pri lingvaj scioj ununura, kiu senerare respondis ĉiujn demandojn estis Astrid Birbak-DK), kaj dum ĝenerala inteligenco, dum kiu en kvizo oni devis montri siajn konojn de la lingvo Esperanto, de geografio, de la historio de Esperanto-movado ĝenerale kaj de la historio de fervojista Esperanto-movado, dum kiu la plej bonajn konojn pruvis Jan Niemann (DK). Dum la vespero kun lokaj esperantistoj (venis tri de la E-rondo Šumperk) oni ĝuis tombolon

kun sekva aŭkcio, dancis, kantis ...

Specialan premion de IFEF, kiun ricevas ĉiujare la plej multflanka partoprenanto (en sportaj kaj lingvaj disciplinoj, tamen kondiĉe, ke li aŭ ŝi estas membro de IFEF kaj tian premion ĝis nun ne ricevis) gajnis ĉiujare Jiří Vencel el Ĉeĥio.

Dum la skiantoj skiis, la promenantoj promenis ekkonante la turisme interesan ĉirkaŭaĵon: Vizitis la kastelon (nur korton, ĉar la kastelo troviĝas en vintra dormo), ekkonis la teknologiojn de manproduktado de papero en la lasta tiuspeca paperfabriko, la plej kuraĝaj malgraŭ la alta tavolo da neĝo vizitis la Esperanto-arbon en kastelaparko (ĉio ĉi en Velké Losiny), lignan preĝejon en Maršikov, la urbon Šumperk, la skicentron Červenohorské sedlo kaj aliajn interesajn lokojn en proksimeco.

Venonta IFES okazos en Aŭstria Mülbach dum la dua marta semajno 1997.

Petro Chrdle

## OLOMOUC

Dum kluba kunveno la 12.3.1996 s-ano Jan Duda, membro de la Moravia filharmonio, rememoris sian iaman E-instruonton, la eminentan s-anon Josef Vondroušek per prelego, kiun li akompanis per sia majstra violonludado.

V. Mohapl

## Plua E-filatela sukceso

Singapura filatela asocio kunlabore kun Singapura poŝto, sub aŭspicio de FIP - Internacia filatela federacio organizis dum tagoj 01/10 09 1995 Tutmondan filatelan ekspozicion, kies Alta Protektanto estis singapura Prezidento Ong Teng Cheong.

Sukcese ĝin partoprenis ankaŭ s-ano Vladimír VAŇA el Plzeň. Lia, jam tutmonde konata eksponaĵo: „Capitroj el historio de Esperanto“ gajnis grandan arĝentan medalon.

Ni elkore gratulas.  
-vlha-

**Esperanto ricevis prioritaton antaŭ la angla**

FISAIC - senprofita internacia organizo por ripoza aktivado (kultura, sporta) de fervojistoj kaj de fervoj-amikoj, uzanta kiel ĉefajn lingvojn la francan kaj la germanan - preferas ekde la nuna jaro Esperanton antaŭ la angla. Jen efektiva pruvo, ke Eo ne estas afero de nuraj „hobiuloj“, sed reale praktika komunikilo. Tial samtempe la IFEF-sekcio de CEA (fervojista sekcio) fariĝis parto de FISAIC. La organizo laŭ siaj ebloj eĉ materiale subtenos ankaŭ E-araĝojn en eksterlando aprobitajn en la plano de FISAIC. Certajn avantaĝojn povas ĝui eĉ ne-fervojistoj, se ili partoprenas laboron en fervojistaj interesrondetoj kaj kluboj.

Zdeněk Polák  
komisiito de IFEF  
por FISAIC-kontaktoj

## Jus eldonita nova poemkolekto de Jiří Karen.

La Bmoa eldonejo Georgetown (Jiříkov) aperigis omaĝe al la 75-a jubileo de Jiří Karen, konata ne nur kiel ĉeĥa, sed ankaŭ kiel Esperanta aŭtoro, la poemkolekton **Svět laskavý nejen na slova** (La mondo afabla ne nur je vortoj). En la trarigardo de la ĝis nun eldonitaj poemaroj de J. Karen ne mankas mencio de liaj eldonaĵoj en Esperanto *Antaŭ la naŭa ondo* kaj *Flugilhava ŝtono*.

Al la aŭtoro mi kore gratulas kaj al la legantoj mi rekomendas mendi la plaĉan verkon (prezo 49.- Kč) en la eldonejo Georgetown (Jiříkov), Mikulovská 1, 628 00 Bmo.

Petro Chrdle

## Nova monumento al Zamenhof

estos starigita en Aix en Provence la 4-an de majo 1996 danke al la urbestro Monsiuer Jean-François Picheral, Maire d'Aix en Provence, Hôtel de Ville, 13100 Aix en Provence, Francio. Tuj sendu gratulojn!

**81. SVĚTOVÝ  
KONGRES  
ESPERANTA**  
Praha 20.-27. 7.1996

## Belarusa lernolibro de Esperanto

En aŭtoŝtona Respubliko Belorusio estas aperinta ĝis nun entute unua belarusa lernolibro de ia fremdlingvo MOVA ESPERANTA (La lingvo Esperanto) (Minsk, Eldonejo „Scienco kaj tekniko“, 1992. paĝ. 160) de Adam Paŭljukavec, kiu estas destinita por malnovaj esperantistoj, dezirantaj varbi novajn adeptojn de Esperanto kaj por komencantaj aŭtodidaktaj.

La aŭtoro unue verkas mallongan historion de Esperanto-movado en Belorusio. Postsekvas la parto pri ortografio kaj prononcado (pri grafika kaj fonika ebenaĵoj) de Esperanto. La aŭtoro tradicie asertas, ke nia Lingvo Universala havas 28 literojn kaj sonojn. Ni rimarkas, ke en Esperanto estas ja 28 literoj, sed 29 sonoj, tio signifas 5 vokaloj kaj 24 konsonantoj. En la fonologia sistemo de Esperantaj konsonantoj estas ĉeestantaj fonologiaj opozicioj de la eco „voĉeco - senvoĉeco“ kiel en la belarusa, jene duopoj de kontraŭstarantaj konsonantoj **b - p**, **v - f**, **d - t**, **dz - c**, **z - s**, **dĝ - ĉ** (ĝ - ĉ), **ĵ - ŝ** (ĵ - ŝ), **h - x** (h - ĥ) portantaj la signifon, kiuj estas kapablaj precize diferencigi la sencon de minimumaj belarusaj kaj ankaŭ Esperantaj paroj de vortoj kaj vortformoj. Oni devas konscii, ke „en Esperanto **dz**“<sup>1)</sup> konsistigas el fonologia vidpunkto unu fonologian unuon en kontrasto kun **c**: **edzo/eco**“<sup>2)</sup>. Ĉi tiu fonemo **dz** troviĝas ankaŭ en la belarusa (tiel same kiel en la slovaka)

foneminventaro: **dzynkavaĉ** (= zumadi; tinti) - **cynkavaĉ** (= zinki). Komparu en la slovaka: **sadza** (= fulgo) - **sáca** (= li, ŝi, ĝi puŝas), **priadza** (= fadeno) - **práca** (= laboro). La aŭtoro ja skribas pri elparolado de belarusa kaj Esperanta fonemo **h**, sed el fonologia vidpunkto estas necese doni ekzemplojn, vortparojn, en kiuj belarusa kaj Esperanta konsonanto **h** konsistigas unu fonologian unuon en kontrasto kun **ĥ**; ekzemple en la belarusa **hod** (= jaro) - **xod** (ĥod; = irado), **hará** (= monto) - **xára** (ĥára; = buŝego). En Esperanto **horo** - **ĥoro**. La aŭtoro taŭge mencias la **ŭ**-sonon, la nesilabecan duonvokalon **ŭ**, prononcatan simple kiel tre mallonga **ŭ** en la belarusa (kaj ankaŭ en la slovaka lingvo) kaj en Esperanto.

En la gramatika parto estas per malmultaj vortoj priskribitaj kaj klarigitaj la vortspecoj. La aŭtoro eksplikas memsencajn vortojn kun frazartikola funkcio. Unue la nomojn, la substantivon kun vortspeco unusignifa finaĵo **-o**, la adjektivon kun vortspeco unusignifa finaĵo **-a**, la pronomojn kun la tabelvortoj, la numeralojn kaj la adverbojn (ankaŭ kun la tabeladverboj) kun vortspeco unusignifa finaĵo **-e**. La aŭtoro priskribas la gramatikan finaĵon (gramatemo) de nomoj en akuzativo **-n** kaj en pluralo **-j**. Bedaŭrinde mankas la anonceto pri la belarusa (kaj ĝenerale slava) fenomeno, ke la distribuon ĉe numeraloj oni esprimas per la slava prepozicio **po**.

Due la aŭtoro eksplikas la verbon kun vortspeco unusignifa finaĵo **-i**, unusencajn gramatikajn finaĵojn (gramatemo) de prezenco **-as**, de preterito **-is**,

de futuro **-os**, de kondicionalo **-us**, de imperativo (volitivo) **-u** kaj aktivajn **-inta**, **-anta**, **-onta** kaj pasivajn formojn /finaĵojn **-ita**, **-ata**, **-ota** de la participoj de preterito, prezenco kaj futuro.

Poste la aŭtoro priskribas gramatikajn vortojn sen frazartikola funkcio: prepoziciojn, konjunkciojn kaj subjunkciojn. partikulojn kaj interjekciojn.

En sintakso mankas la anonco pri belarusaj (kaj ĝenerale slavaj) frazstrukturo kun relative libera vortordo.

Tute ne estas konciza informo pri Esperanta vortprovizo laŭ deveno. Novajn vortojn en Esperanto oni formas per derivado, vortformado, per afiksado de prefiksoj kaj sufiksoj al vortforma bazo kaj per vortkunmeto, formado de vortoj per kunigado de du aŭ pluraj vortoj en unu.

En la libreto troviĝas praktika lingva materialo oportune saturigita per studitaj kaj ekkonataj lingvaj fenomenoj.

La belarusaj libro de Esperanto enhavas taŭgajn grupigitajn monotemajn tekstojn, parte klare eksplikantajn bazajn sociajn (interpersonajn) parolajn lertecojn: pri lernado de Esperanto, pri familio, gepatroj, bofiloj, amikoj kaj amikinoj kaj pri biografio, kaj parte precize esprimantajn standardajn parolajn situaciojn pri jaro kaj jarsezonoj, pri tagnokto (diurno), pri loĝejo kaj laborato, pri korespondado en Esperanto, pri Esperanta festotago, pri ripoztago, pri nutrajvendejo, nutraĵoj kaj universala magazeno. Krom tio en ĉi tiu lernolibro troviĝas zorgeme elektita krestomatia de belarusaj poezio (p. 97-131) kaj Esperanta-belarusaj vortaretoj (p. 132-

158).

La aŭtoro iel forgesas, ke lernado/instruado de Esperanto kaj de iuj aliaj fremdaj lingvoj apogita sur konscia scipovo de unuopaj lingvaj ebenaĵoj de la gepatra belarusaj lingvo ludas nenanstataŭigeblan rolon kaj havas grandan signifon kaj estas tre grava por bona menseduko kiel speciala koncepto por disvastigo de gramatika pensado<sup>3)</sup>.

Multflanka motivado kiel baza koncepto de MOVA ESPERANTA de A. Paŭljukavec kaj alirebla stud/lermomaterialo estas fundamentaj elirpunktoj por pliperfektigi ne nur eksterlernejan memlernadon, sed ankaŭ por plikvalitigi didaktikan agadon en instruoprocezo de la Internacia Lingvo helpe de ĉi tiu simpatia libreto.

Eduard Gašinec, prof.

Bratislava, Slovakio

#### GLOSOJ:

1) Por skribkapti la Esperantan fonemon (sono) **dz** oni uzas du literojn.

2) WARINGHIEN, G.: Plena ilustrita vortaro de Esperanto. Represo de la dua eldono. SAT, Parizo 1981, paĝ. 302; rigardu ankaŭ KALOCSAY, K., WARINGHIEN, G.: Plena analiza gramatiko de Esperanto. Kvara, tralaborita, eldono. UEA, Rotterdam 1980, paĝ. 48

3) J. A. KOMENSKÝ: Najnovšia metóda jazykov. Plej nova metodo de lingvo-instruado. En Vybrané spisy (Selektita verkaro). Vol. IV., SPN, Bratislava 1959, paĝ. 104-105.



## GUSTUMU LA CIGANAN

Ciganoj (aŭ Romaoj) estas unu el la plej grandaj minoritatoj en nia respubliko. Nian interetnan kunvivadon komplikas malgranda scio pri la ciganaj historio, kulturo kaj lingvo, kvankam ili vivas en nia lando jam duonan jarmilon kaj ilia vivo inspiris gravajn verkojn al niaj artistoj (Mácha, Vrchlický, Mánes) samkiel al mondaj (*Carmen* de Bizet, *Cigana barono* de Strauss, *Cigana amo* de Lehár, *Ciganaj romanoj* de García Lorca). Almenaŭ ni esperantistoj, kiujn interesas la lingvoj, sciu minimumon ankaŭ pri ilia idiomo.

La deklinaciado havas 8 kazojn kaj du genojn (viran kaj inan). Ni rigardu ekzemple la substantivon *raklo* (knabo):

singularo:

nom. rakl-o	knabo
vok. rakl-eja!	knabo!
akuz. rakl-es	knabon
dat. rakl-es-ke	al knabo
lok. rakl-es-tar	pri knabo
abl. rakl-es-tar	(direkte) de knabo
instr. rakl-e-ha	kun/per knabo
gen. rakl-es-kero	(havaĵo) de knabo

pluralo:

nom. rakl-e	knaboj
vok. rakl-ale!	knaboj!
akuz. rakl-en	knabojn
dat. rakl-en-ge	al knaboj
lok. rakl-en-de	pri knaboj
abl. rakl-en-dar	(direkte) de knaboj
instr. rakl-en-ca	kun/per knaboj
gen. rakl-en-gero	(havaĵo) de knaboj

Deklinaciataj estas ankaŭ la adjektivoj, pronomoj kaj numeraloj, sed ni prefere

rigardu konjugacion de iu verbo, ekz. *kerel*:

	ker-el	fari
(me)	ker-av	mi faras
(tu)	ker-es	ci faras
(jov)	ker-el	li faras
(joj)	ker-el	ŝi faras
(amen)	ker-as	ni faras
(tumen)	ker-en	vi faras
(jon)	ker-en	ili faras
	ker-ava	mi faros
	ker-eha	ci faros
	ker-ela	li/ŝi faros
	ker-aha	ni faros
	ker-ena	vi faros
	ker-ena	ili faros
	ker-avas	mi faris/farus
	ker-ehas	ci faris/farus
	ker-elas	li/ŝi faris/farus
	ker-ahas	ni faris/farus
	ker-enas	vi faris/farus
	ker-enas	ili faris/farus
	ker!	ci faru!
	ker-as!	ni faru!
	ker-en!	vi faru!
	ma ker!	ne faru!

La romaa lingvo estas sufiĉe komplika, havas multajn aliajn modelojn de deklinacio kaj konjugacio kaj ne multajn esceptojn kiel ĉiu hindeŭropa lingvo. Eble interesos vin ankoraŭ kelkaj vortoj: **ha** jes, **na** ne, **jekh** unu, **duj** du, **trin** tri, **ŝtar** kvar, **panĉ** kvin, **ŝov** ses, **efta** sep, **oĥto** ok, **enja** naŭ, **deŝ** dek, **dad** patro, **dajori** patrino, **phral** frato, **phen** fratino, **ĉavoro** infano, **ŝukar** bela, **kaj** kie, ke, the kaj, **abo** aŭ. -mm-

**Ebbe Vilborg: ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO, volumo 4: N-R, Eldona Societo Malmö 1995, 124 p., 33 gld.**

Post la tri unuaj volumoj (A-D, 1989; E-J, 1991; K-M, 1993) la sveda lingvisto Ebbe Vilborg eldonis kvaran parton de sia meritplena verko, la etimologia vortaro, per kiu nia movado ricevas detalan informon pri la deveno de la fundamentaj kaj oficialigitaj vortoj en Esperanto. Lingvo internacia, kiu volas servi al la homaro en ĉiuj sferoj de la vivo (arto, scienco, tekniko, metioj, sporto, ekonomio ktp.) bezonas ampleksigi sian vortprovizon laŭ certajn de unuopaj fakoj kaj respekti certajn principojn, kiel adopti novajn vortojn. Tiujn principojn necesas studi ĉe la baza vortprovizo, kaj la etimologiaj analizoj povas plej multe komprenigi. Sed ne nur por fakuloj estas la verko interesa. Ankaŭ ordinaraj esperantistoj ofte deziras kontentigi sian scivolemon, de kie kaj kiel venis tiu aŭ alia vorto en Esperanton, kia estis ĝia origina signifo ktp. En la libro oni povas ekz. ekscii, ke kun la vorto *naski* estas etimologie parencaj *nacio* (naskitaro), *naiva* (denaska, senruza) kaj *naturu* (naskita, kreita).

La vortaro estas aranĝita tiel, ke unue ni ekscias, ĉu la forto estas Fundamenta aŭ per kiu Oficiala Aldono ĝi estis akceptita. Poste sekvas ekvivalentoj en la mondlingvoj aŭ aliaj gravaj lingvoj, uzantaj la saman etimon, eventuale eĉ en aliaj interlingvoj (Ido, Interlingue, Interlingua). En alia alineo per malpli grandaj literoj estas klarigita la origino kaj signifo de la etimo, kaj vortoj parencaj. Ni prezentu malgranen ekzemplon:

PAN/O (f; Un): L *panis*: F *pain* (kp *paner* "-umi"), I *pane*, (H *pan*). Kp G *pan/ieren*, R *irovat'* "-umi". Bazita sur L. ¶ Io=, Ie *pan*, Ia *-e*.

L *panis* el *\*pastnis*, radikparenca al L *pascti* "paŝti" (vd. tiun). Ceteraj samfamiliaj vortoj en Eo: *akompani*, *kompanio*, *pastelo*.

KLARIGOJ: fundamenta vorto aperinta jam en la Unua Libro 1887 (f; Un). Formoj en la lingvoj latina, franca, itala kaj hispana (L, F, I, H). En la franca, germana kaj rusa (F, G, R) aperas en verboj kun signifo "panumi". En Ido (Io) la vorto havas la saman formon, en Interlingue (Ie) *pan*, en Interlingua (Ia) *pane*.

mm

### Esperantisto Slovaka revenas

La fama periodaĵo, festanta ĉijare sian 50-jaran jubileon, reaperas sub redakto de Stano Marček. La abono estas libervola, ricevos ĝin ĉiu, kiu sendos financan subtenon laŭ siaj ebloj. Skribu al: Esperantisto Slovaka, Stano Marček, Zvolenská 15, 036 Martin, Slovakio.

Samtempe aperis **La Dua Jarcento 1/1996**, slovakia-aŭstria gazeto, kiun en Ĉeĥio distribuas V. Hasala, poŝtkesto 34, 696 62 Strážnice.

### GAZETOJ SERĈATAJ

Mi serĉas malnovajn E-gazetojn (aĉete aŭ interŝanĝe), antaŭ ĉio: Ligilo 10 1939: n-o 9-12; Zprávy Čs. esp. výboru/ Informoj de Ĉeĥosl. Esp.-Komitato (1959-1964): n-o 3, 4, 5, 9, 11, 12, 14. Skribu al: Mgr. Zd. Hršel, Botanická 28, 602 00 Bmo.

**KTI**  
(komisiono por gazetaro kaj informado)

Unu el gravaj taskoj estas instigi skribadon de artikoloj pri esperanto aŭ tradukadi interesajn el E-presajoj en ĉehan gazetaron. Ofte ŝajnas al esperantistoj, ke vizito de eksterlandano en klubo estas io memkomprenebla, kio ne povus interesi la publikon. Granda eraro - la publikon tiaj artikoloj interesas. Neniam forgesu priskribi ĉiun viziton, gvidu la eksterlandan gaston rekte en la redakcion, kie oni povas lin intervjui, ofte oni sendos redaktoron en vian klubon. Neniam forgesu sendi vian kluban cirkuleron al redakcio de loka gazeto, por ke oni povu ĉerpi el ĝi informojn, kiuj interesas la publikon.

En 1995 ni sukcesis kolekti 113 artikolojn pri nia movado kaj 160 anoncojn de kursoj.

**INFANOJ EN LA MONDO**  
**Internacia interlerneja revuo**  
revenas

Dum multaj jaroj s-ro Marcel Erbeta eldonadis interlenejan revuon *Graĵoj en Vento*, al kiu kontribuis la infanoj mem, sed li devis ĉesigi la laboron pro sia aĝo. Nun ni volas reeldonadi ĝin sub la nomo *Infanoj en la mondo* sekvante la saman metodon. Partopreni povas ĉiu lernejo, lemantklaso aŭ interklasoj, kaj geknabaj grupoj tiucelaj. Ĉiun ni nomos „sekcio“.

Ĉiu sekcio sendas al la Centra Redaktejo sian kunlaboraĵon, kio estas: 6 folioj kun desegnoj kaj/aŭ tekstoj, unu aŭ duflanke, diversaj aŭ egalaj, sur ordinara papero, formato 21 x 28 cm, koloro libera. Ĉio en Esperanto. Verku

pri via familio, urbo, lernejo, geamikoj, sed evitu abstraktajn, politikajn aŭ naciajn temojn.

La Centra Redaktejo, ricevinte la 6 foliojn, kunigas ilin kun samnombraj ricevintaj de kvin aliaj landoj, bindas ilin kaj resendas al la 5 landoj. La sesa ekzemplero restas en la redaktejo por arkivo.

Skribu al: S-ro Enrique Kohel, redaktejo de „Infanoj en la mondo“, Casilla Correo 407, 2600 Venado Tuerto, Argentino. La partopreno estas aŭtomata, ne atendu, tuj sendu la materialon.

**Kunlaboro kun FISAIC**

FISAIC, la granda internacia kultur-organizo de la fervojistoj, dankas sian fondiĝon kaj evoluon nelaste al aktivecoj de esperantistaj fervojistoj. Por ne forgesi tion, ni dediĉas ĉi tiun inform-artikolon al niaj rilatoj al tiu organizo.

La iniciatinto de FISAIC estis d-ro Marcel Mollion el Francio, kiu en la jaroj ĉirkaŭ 1950 estis prezidanto de Franca Asocio de Kulturflugantaj Fervojistoj (UAICF), poste landa sekcio de FISAIC. La konata pariza renkontiĝo de francaj kaj nederlandaj geesperantistoj en 1947 kaj eĉ pli la 3-a IFEF-kongreso en Parizo 1951 konvinkis d-ron Mollion, ke Esperanto estus utila por starigi internacian kulturalan federacion de fervojistoj. La 15-an de novembro 1952 okazis la fondkunveno en Strasbourg en ĉeesto de reprezentantoj el 9 eŭropaj landoj.

La novan federacion oni nomis franc-lingve „Fédération Internationale des Sociétés Artistiques et Intellectuelles de

Cheminots", por ni pli komprenebla Internacia Federacio de Kulturflegantaj Fervojistoj. En junio 1953 estis aranĝita la 1-a Ĝenerala Asembleo. Tie oni decidis, ke apud la sola laborlingvo, la franca, Esperanto estos uzebla same kiel aliaj naciaj lingvoj. Nuntempe FISAIC precipe dankU al klopodoj de la francaj kolegoj uzas tri laborlingvojn, krom franca kaj germana ankaŭ Esperanton.

FISAIC ne celas materialan gajnon. Ĝia emblemo estas pelvo, kiu kuŝas sur flugilrado. El la pelvo lumas flamo. Medalojn el oro, arĝento kaj bronzo (ne puraj metaloj) FISAIC donas okaze de konkursoj kaj ekspozicioj, sed ankaŭ pro elstaraj personaj meritoj al unuopaj personoj, ekz. esperantistoj. Tiaj medaloj estas la plej altaj distingaj akireblaj en fervojista medio.

En ĉiujare eldonata „aranĝo-kalendaro“ estas publikigataj ĉiuj internaciaj okazontaĵoj aranĝotaj sub aŭspicio de FISAIC en la venontaj jaroj, do ankaŭ la IFEF-kongresoj. En 1981 FISAIC kreis propran flagon laŭ propono de GEFA. Ĝi flirtis la unuan fojon antaŭ la kongresejo de la 33-a IFEF-kongreso en Resensburg.

Laŭ la FISAIC-statuto membreco en ĝi nur eblas pere de la landaj sekcioj de FISAIC. Tio signifas, ke neniel internacia organizo (ekz. IFEF) povas rekte membriĝi, sed nur ĉiu unuopa landa asocio de IFEF pere de sia landa sekcio de FISAIC. IFEF ne nur ekzistis jam antaŭ la fondiĝo de FISAIC, sed eĉ servis kiel modelo por ties starigo, kaj ĝi estas la sola internacia organizo, kiu dum la tuta ekzistado de FISAIC regule ĉiujare aranĝis la kongreson.

Nuntempe FISAIC havas 26 landajn sekciojn kaj starigita minimuma membrokoto estas 200 SF. Nuntempa ĝene-

rala prezidanto estas Gilbert Schmidt el Luksemburgio, alvicigita ĝenerala prezidanto sinjoro Semmelrath el Aŭstrio kaj ĝenerala sekretario sinjoro Wallerand el Francio.

Dum Ĝenerala Asembleo en oktobro 1990 ankaŭ ĈSD estis akceptita kiel landa sekcio de FISAIC. Post akcepto oni fondis Landan Asocion kaj Landan Konsilantaron de FISAIC. Kondiĉoj de membreco en FISAIC estas starigitaj en la statuto. Post divido de ĈSD je ĈD kaj ŽSR transiris membreco de ĈSD al ĈD kaj ŽSR petis pri akcepto kiel landa sekcio dum la Ĝenerala Asembleo en Helsingborg (Svedujo) en 1993.

Ĝis la jaro 1994 ĈSD - ĈD agis kiel peranto por orienteŭropaj membroŝtatoj en FISAIC.

En la ĉeĥa landa sekcio de FISAIC al la plej agemaj membrogrupoj apartenas esperantistoj kaj radioamatoroj. Konstanta reprezentanto de FS ĈEA en landa sekcio de FISAIC estas inĝ. Zdeněk Polák, komitatkunvenojn laŭ ebleco partoprenas la prezidanto aŭ sekretario de FS ĈEA. Oni strebas laŭeble plibonigi reciprokan informadon kaj kunlaboron. Post aprobo de la financa buĝeto de „FKSP ĈD“, en kiu estas proponataj por agado de la landa sekcio de FISAIC financaj rimedoj, oni espereble ricevos financan subtenon por sia agado.

En kadro de aprobita plaĝo de la agado de FISAIC por 1997 Ĉeĥaj Fervojistoj ĈD estas aprobita kiel organizanto de la 17-a internacia jarkonkurso Filmo kaj video.

Jindřich Tomišek

## Informoj el komitato de ĈEA

Ĉar la januara komitatkunsido okazis nur post la finredakto de la 1-a numero de Starto kaj intertempe okazis ankaŭ la dua ĉijara kunsido, ni infomas pri ambaŭ traktadoj samtempe. La sesioj okazis en Nymburk kaj en Dobřichovice.

La ĉefaj programeroj estis mastrumado de la asocio en la pasinta jaro kaj buĝeto por jaro 1996. Pri tio ni detale informas aliloke. Nature, ke gravaj punktoj de ĉiu traktado de la komitato estas ligataj al niaj kongresoj. Pri la 81-a estas solvata logigo de enlandaj kongresanoj, poste estis raportite pri stabo de helpantoj, por kiu oni aranĝis sukcesan seminarion en Nymburk - vidu la apartan informon. La LKK-prezidanto informis pri vico da solvataj gravaĵoj kaj ankaŭ pri kelkaj aferoj iom lamantaj, ekz. la nacia programo, sponzoroj, dokumentujo.

La legantoj scias, ke ĉijare okazos ankaŭ la 8-a kongreso de ĈEA en Havířov. Estis faritaj jam unuaj paŝoj - enketado pri balotmetodo, formiĝis ankaŭ la elektokomisiono sub gvido de J. Pištora. Ankaŭ el Havířov venis pozitivaj informoj pri eklaboro de organiza kolektivo pri la kongreso.

Grandan atenton la komitato dediĉis al Esperanto-kluboj. Komitatanoj kaj mi mem ofte vizitas klubojn laŭ invitoj por helpi al ili solvi iujn problemojn. Tiel klariĝis situacio en Liberec, en kelkaj kluboj ŝanĝiĝas jura stato. Pri tiu laboro respondecas en la komitato s-ano P. Polnický, kiu laŭbezone informas klubojn pri ties devoj lige kun imposta deklaro,

se oni aktive entreprenas. Mi devas konfesi, ke al multaj niaj funkciuloj en estas kelkaj devoj klaraj - sed ofte oni renkontas diversajn kaj malsamajn komprenojn al la validaj leĝoj el flanko de ofiĉistoj en impostoficejo. Sed oni devas eviti malklaraĵojn por ne havi eventualajn malagrablaĵojn.

El la pasintaj taskoj la komitato revenis al la memortabulo pri la 13-a UK, kiun oni ĝis nun ne sukcesis publike fiksi sur tiama kongresejo Žofín (sur Slava insulo). La memortabulon financis SAT. Post longa persista malkonsento flanke de koncerna domposedanto estis tamen fine ricevita promeso pri instaligo - danke al iniciatemo de s-ino Maudrová el Praha.

Fine la komitata kunsido detale solvadis diversajn organizajn aferojn, kiuj gravas por asocia vivo: estis proklamita nova membrokategorio N - por nevidantoj. Plue estis adaptita nova asocia membrolegitimilo kaj la novaj estas jam disponeblaj ĉe la asocia adreso. La asocio presigis novajn poŝtpagilojn. En kunlaboro kun la ĉefdelegito de UEA St. Chrdlová oni kontrolis nian membroliston en UEA kaj akceptis kelkajn ofertojn pri kompletigo de la asociaj vendovaroj, kiujn libroserve prizorgas ing. Z. Pluhař. Pluaj diversaj kurantaj aferoj kaj necesaj informoj fine fermis la kunsidojn.

La venonta komitata kunveno okazos meze de aprilo en Opava.

VI. Kočvara

## KELKAJ JUBILEOJ

En 1996 ni devas rememori plurajn gravajn jubileojn de nia movado. Antaŭ 95 jaroj (1901) estis en Brno fondita la unua societo de aŭstriaĵaj esperantistoj, antaŭ 75 jaroj (1921) okazis en Prago la 13-a UK, antaŭ 50 jaroj (1946) aperas gazeto Esperantista sub redakto de Kamarýt.

Antaŭ 90 jaroj (1906) naskiĝis niaj eminentaj tradukmajstroj d-ro Tomáš Pumpř (*Bapto de caro Vladimir, Reĝo Lavra, Bukedo, Majo, Najado, Vendita fianĉino*) kaj Jiří Kořinek (*Panjo, Manon Lescaut*) kaj antaŭ 20 jaroj (1976) mortis nia eble plej granda tradukisto Miloš Lukáš (*Nokto en Karlův Týn, Muta barikado, Romanco pri Karlo IV.*)

Sed ni ne forgesu niajn nuntempajn jubileulojn. Niajn gratulojn meritas poeto Ĉestmír Vidman (1921), operkantisto Miroslav Smyčka kaj vortaristo Karel Kraft (ambaŭ 1926), estro de Esperanto-muzeo en Česká Třebová Jiří Pištora (1931), nia prezidanto ing. Vlastimil Kočvara kaj iama asocia sekretario ing. Zdeněk Pluhař (ambaŭ 1936), estro de la katolika sekcio Miroslav Šváček (1941), asocia vicprezidanto doc. Petr Chrdle kaj komitatano el České Budějovice ing. Irena Papírníková (ambaŭ 1946).

## Ni kondolencas

**Ing. Karel Janouš (4.2.1916-21.3.1996)**  
Nia aktiva kaj ŝatata membro Ing. Karel Janouš naskiĝis 4.2.1916 en Čekanice ĉe Tábor. Esperanton li komencis studi dum studentaj jaroj. Entuziasme li in-

struis kaj prelegis ne nur en nia klubo, sed ankaŭ en SET-Lančov kaj en junulara katolika tendaro en Sebranice. Li ankaŭ laboris en funkcioj en iama Ĉeĥoslovaka esperanta asocio kaj en Nordmoravia regiono li dum multaj jaroj gvidis esperanto-aktivadon. Tiam estis lia laboro taksita kiel *modela por aliaj regionoj*. Li ŝatis historion kaj multfoje prelegis pri komenco de nia movado en Ostrava. Eksterordinare li interesiĝis pri lingvistiko kaj terminologio. Li verkis originalajn poemojn kaj multfoje preparis por nia klubo muzikajn programojn. Li mem ludis violonon. Multfoje li partoprenis UK-ojn de UEA. Dum lastaj jaroj li estis elektita honora prezidanto de nia klubo. En jaro 1989 li estis de ĈEA honorigita per titolo „honora membro de ĈEA“. Li mortis post mallonga malsano 21.3.1996. Lia enterigo okazis 29.3.1996 en preĝejo de Virgulino Maria en Ostrava-Prívov. Ni perdis signifan batalanton por venko de nia afero. -drkoč-

Niajn vicajn forlasis por eterne ...

**PhDr. Erich Spitz, CSc** mortis en aĝo de 75 jaroj la 19.1.1996. Li instruis en Minista altlernejo (Vysoká škola baňská) la germanan lingvon. Kiel lingvisto li recenzis la lemolibron de Barandovská, preparis propran lemolibron sur scienca bazo, prelegis pri lingvistikaj problemoj en E-klubo en Ostrava.

S-ino **MUDr. Alena Marková** el AŠ, en ĈEA ekde 1974, dumviva membrino, mortis 1.1.1996 en sia 55-a jaro.

S-ano **Eduard Bařák** el Stonava, distrikto Karviná, mortis jam meze de la pasinta jaro pro laborakcidento en aĝo de 54 jaroj.

# *Venu al Praha!*

Miloš Lukáš

Al apostoloj de amo, revantaj pri paco eterna,  
Ĝoje mi kantas hodiaŭ kaj ilin tutkore salutas.  
Se vi en jaroj pasintaj, dum kiuj suferis la mondo  
- Kiam la homoj sin buĉis, pelate de blinda kolero,  
Kiam kanonoj bruegis kaj kiam ploradis patrinoj -  
Sentis ĉagrenon en koroj, kaj se al vi ofte jam ŝajnis,  
Ke la majesta ideo, por kiu vi volis batali,  
Trovos neniam komprenon, ke vane predikis vi ĉiuj  
Al la popoloj diversaj - komencu esperi denove!  
Pasis la nokto terura. Tagiĝas! Aperas mateno!!  
Ĉu vi hezitas? Vi dubas?? - Alvenu, kaj baldaŭ vi kredos:

Jen en la urbo centtura, en la metropolo bohema,  
Kiun trateksas Moldavo, rivero kun ŝaŭmo argenta,  
Trovos vi feston solenan. En ombro de verda standardo  
Aron da homoj vi vidos: el mondregionoj malsamaj  
Ili kunvenis ĉi tien. Kaj nune rigardu miraklon:  
Greko kaj serbo konkorde parolas kun vigla bulgario,  
Franco kaj anglo salutas afable amikon germanan,  
Frate jen premas la manon hungaro al ĉeĥa kunulo.  
Ĉiuj sin bone komprenas per helpo de lingvo belsona.  
Sed ne nur lingvo komuna kunigas la tutan anaron:  
Ankaŭ komuna spirito - spirito de amo sincera -  
Loĝas en koroj iliaj. Prospere ekĝermis la semo,  
Kiun enplantis la Majstro, la nobla kaj glora profeto ...

Se vi do revas pri paco, pri savo de l' tuta homaro  
Kaj se vi serĉas nur vojon, por tiun ĉi celon atingi,  
Sciu: ĝi estas trovita! Ekiro ĝin kuraĝe.  
Viaj klopodoj sukcesos - komencu nur! Venu al Praha!!

*Poemo de Miloš Lukáš el la jaro 1921 aktualas ankaŭ nun.*

Český esperantský svaz  
ESPERANTO, p. s. 1069  
111 21 Praha 1

☆ **STARTO** ☆

Periodikum Českého esperantského svazu

Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno

Členská evidence a změny adres: Květa Hubnová, ČES Praha

---

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 15 gld

Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno

Ĉeĥa Respubliko

---

Podávání novinových zásilek povoleno

Českou poštou, s. p., Odštěpným závodem Severní Morava,

č. j. 1533/95-P/1 ze dne 3. 8. 1995

## NOVINOVÁ ZÁSILKA

Poštovné hrazeno v hotovosti  
u pošty 746 01 Opava 1